


# PONTO ☆

Jaro 1 N-ro 7 (7) Organo de Sunda Esperanto Agado Decembro 2002

Al ĉiuj SEA-membroj ni deziras

**Bonan Kristnaskon**
kaj bonan finon de la nuna jaro
Por la venonta 2003
ni esperas ke ni kune agadu por sukceso en nia Esperantolaboro

**La redakcio**

## 88-a Universala Kongreso de Esperanto en Gotenburgo 26 julio – 2 aŭgusto 2003

**Kongresa temo:**
Lingvaj rajtoj kaj respondecoj
**Kongresejo**
Svenska Mässan. Estas moderna kaj multfunkcia kongresejo proksime de la urbocentro kaj hoteloj, facile atingebla de la flughavenoj kaj de la publika transportrimedoj.
**Loka Kongresa Komitato**
Roland Lindblom, prezidanto
Christer Lörnemark, vic-prezidanto
Andreas Nordström, sekretario
Siv Burell, vic-sekretario
Ali Koshmashraban, kasisto
Brita Rehm, vic-kasisto
Aino Åberg, Margareta Andersson, Inga Johanson
kaj Franko Luin, sentitolaj

Aranĝi Universalan Kongreson de UEA estas grandega laboro. LKK (Loka kongresa komitato) komencis sian laboron ek de la decido pri la kongreso en Gotenburgo.
Dum la kongreso ili vere bezonas pli da personoj kiuj helpas kun diversaj taskoj. La komitato petas ĉiujn, kiuj havas eblecon anonci sin por iu speciala tasko.......
Anoncu vin al Andreas Nordström, Esperanto-Societo de Gotenburgo, Masthuggsliden 1, 413 18 Göteborg, aŭ rete al andreas.n@bredband.net.

## La SEA-kunsido la 8-an de marto 2003

**Nia 3-a kunsido en SEA okazos la 8-an de marto en Lund/Malmö. Bonvolu rezervi la tagon kaj ankaŭ** pensu pri la laboro farota en la SEA-regiono. Pli da informoj en Ponto 1-03.

### Eldonplano por PONTO 2003:

| | |
|---|---|
| N-ro 1 | 7-an de februaro |
| 2 | 21-an de marto |
| 3 | 23-de majo |
| 4 | 28-an de aŭgusto |
| 5 | 26-an de septembro |
| 6 | 7-an de novembro |
| 7 | 6-an de decembro |

La materialo por la gazeto estu kiel kutime ĉe mi du (2) semajnojn antaŭ la eldondato
Se vi havas vidpunktojn sciigu min!
Karin Lindquist

## Kurso por instruistoj en Malmö 23-an de februaro 2003

SEA bezonas instruistojn kaj ni planas kurson por vi kiu povus imagi fariĝi insturisto kaj eble iam gvidi kurson pri Esperanto. Interesa ankaŭ por vi kiu planas partopreni en la UK en Gotenburgo.!

**Gratulon!**
La 26an de novembro je 21.06 horo la hejm-paĝo www.esperanto.se registris sian 4.661.616-an vizitanton! (El La Hirundo)

Nästa **Ponto**
utkommer ca 7 febr.
Skicka allt material till
*Karin Lindquist*
senast den 25 jan.

*Sunda Esperanto Agado*
Reto de la Esperanta kunlaboro en la Sunda regiono

Redaktionskommitté*/redakta komitato:*
**Kontaktperson:** *Karin Lindquist* *karin@agado.net*
Sergels väg 14A, SE-217 57 Malmö +46 40 98 01 20

Övriga/kromaj anoj: Sten Svenonius (paĝaranĝo), Helen Claesson (desegnaĵoj), Johan Svenonius (tekniko), Per-Olov Johansson (presado), Gertrud Lund.



ISSN 0907-127X

# La Folio

Klubo Esperantista de Malmö

*Jaro 72  N-ro 7 (677)* » Ĉiam antaŭen «

Fondita en 1906

***BONAN KRISTNASKO***
***kaj***
***FELIĈAN NOVAN JARON!***

**deziras al ĉiuj legantoj jenaj personoj, kiuj samtempe iom pliigas la kluban kason:**

| | |
|---|---|
| Gerd Rodén | Gulli Svensson |
| Ulla Ullfors | Wivi Nilsson |
| Lissi k Kjell Persson | Elsy kaj Albert Vel |
| Gertrud Lund | Agneta Lund |
| Karin Lindquist | Karin och Anders |
| Alf  Mobark | Rylander |
| Åke Palm | Sten Svenonius |
| P.-O. Johansson | Asta Schaedel |

Sankta Luĉio,
hela kaj ĉarma!
Kuŝas nun nigra nokt*
froste malvarma.
Kovas ĝi en embusk*
Ombrojn kaj sorĉon.,
Vi tamen el krepusk*
levos lum-torĉon
En tiu ĉi sezon*
Venu kun via
brila kandela kron*
Sankta Luĉia!

Brila en blanka vest'
donas vi gracon
kaj por Kristnaska
fest'
benon kaj pacon
Nokton jam venkas
hel'
lumo ekreĝas
Al vi, ho Lum-Anĝel'
ĝoje ni preĝas:
Alte sur hela tron'
lumu kun via

La Luĉion desegnis nia nova kunlaboranto Johanna Skoog, kiu studas esperanton ĉe la Popolaltlernejo de Kvarnby

**Kunveno la 30-an de oktobro**

Nia membro Per-Olov Johansson vizitis Vjetnamion printempe en tiu ĉi jaro. Pri lia vojaĝo ni povis aŭskulti en la klubejo.

La areo de Svedio estas unu kaj duonoble pli granda ol tiu de Vjetnamio sed la nombro de loĝantoj estas 80 miljonoj. Rizproduktado estas la plej grava afero. Pro tio oni frue konstruis sistemojn por akvado.

Post la prelego Per-Olov montris ege belajn kaj interesajn diapozitivojn kiuj ankaŭ estis amuzaj. La turista grupo unufoje vizitis faman restoracion kie ili prunteprenis specialajn vestaĵojn kaj ili aspektis kiel reĝaj gravaj personoj. Per-Olov ankaŭ veturis per bicikla taksio. Ĉarmaj estis bildoj de akva pupteatro. Ne multe la turistoj povas vidi,tion kio memorigas pri la pasinta milito. Sed oni montris subterajn tunelojn (200 kilometrojn entute) en kiuj la soldatoj kaŝiĝis kaj povis surprizataki. La lingvo estas malfacila ĉar ĝi ne similas al nia. La vorto *sinjoro* ekzemple havas kvar sinonimojn.

Tiu nur estas parteto de la enhavoriĉa prelego. Memtravivaĵo ĉiam estas la plej valora!

Lissi Persson

**Konversacia kurso**

Ĉiujn kiuj volas plibonigi sian Esperantan paroladon mi bonvenigas al nia konversacia kurso, kiu komencas denove en januaro, la 20-an. La tempo estas kiel kutime inter la 19-a kaj 20.30-a h.

Kjell Persson

**Ordinara kunsido 13.11**

La ordinara kunsido pritraktis la printempajn programojn kaj studlaboron. La prezidanto Sten Svenonius informis pri la printempaj kursoj 2003, kiuj parte okazos kunlabore kun SEA. Konversacia kurso okazos lunde sub gvido de Kjell Persson.

Gertrud Lund informis pri la printempaj programeroj, vidu sur la programpaĝoj.

Elektoj de funkciuloj estis prokrastataj ĝis venonta kunsido.

Estis decidite aboni Monato, Heroldo kaj La Ondo.

Sten Svenonius kaj Karin Lindquist raportis pri la kunsido en Sunda Esperanto Agado

Malmö Esperantoförening
*Kronetorpsg 94, SE - 212 27  MALMÖ*
☏ 040-18 71 90
Poŝtĝiro: 3 87 14 - 2

Prezidanto:
*Sten Svenonius    sten@agado.net*
☏ 040-19 14 77

(SEA) la 26-an de oktobro. (Vidu sur la 1:a paĝo de PONTO 6). Sten ankaŭ rakontis pri kurso, kiun li gvidas en sia laborloko Kvarnby Popolaltlernejo kun 4 partoprenantoj. Unu el la lernantoj Johanna Skoog volas helpi nin pri la desegnaĵoj en PONTO kune kun Helena Claesson en Kopenhago.
Ĉar la temo de la vespero estis libroj la partoprenantoj rakontis pri interesaj, humoraj kaj lernoriĉaj tiaj, esperantaj kaj svedlingvaj. Spontane la parolo glitis al diversaj dialektoj kaj ni ankaŭ rememorigis unu la alian pri malnovaj skaniaj vortoj dum gajaj ridoj.

Karin Lindquist

**Aŭkcio 24.11**

Nia antaŭkristnaska aŭkcio, la 63-a en la vico, havis lokon tute tradicie. Sten kaj Alf, agantaj kiel aŭkciantoj, same kiel la ceteraj komitatanoj kontribuis al la gaja atmosfero kaj al la bona mona rezulto.

Gertrud Lund

**Dankon**

Al ĉiuj donacintoj kaj aĉetintoj dum la aŭkcio same kiel al mondonacintoj ni eldiras nian plej koran dankon.

## JARKUNSIDO/ÅRSMÖTE

### Klubo Esperantista de Malmö

19 februaro 2003

1. Elekto de prezidanto por la jarkunsido
2. Aprobo de la tagordo
3 Ĝustigo de listo de elektantoj
4 Demando pri laŭstatuta anonco de la jarkunsido
5 Elekto de protokolkontrolanto
6 Jarraporto de la estraro
7. Raporto de la revizoroj
8. Demando pri malŝarĝo por la estraro
9. Elekto de prezidanto por la jaro 2003
10. Elekto de 2 estraranoj kaj 1 anstataŭanto por 2 jaroj
11. Elekto de 2 revizoroj k 2 anstataŭantoj por 1 jaro
12. Elekto de studkomitato kaj studsekretario
13. Elekto de informa komitato kaj inform-sekretario
14. Elekto de programkomitato k programsekretario
15. Elekto de diversaj funkciuloj
16. Elekto de elektoprepara komitato
17. Decido pri vojaĝkontribuo al la jarkunsidoj de Sveda Esperanto-Federacio kaj Eldona Societo Esperanto por oficialaj reprezentantoj
18. Elektoj de reprezentantoj de KEM por la supre nomitaj jarkunsidoj
19. Eventualaj proponoj por la jarkunsidoj de SEF
20. Diversaj raportoj
21. Ceteraj elektoj kaj demandoj

Koran bonvenon al la jarkunsido!
La estraro

**Malnovaj bildoj 4.12**

Finante la jaron ni nostalgie spektis bildojn de pasintaj tagoj. Unue ni rigardis videofilmon surbendigitan de Bernt Lindquist dum SEF-kongreso en Karlskoga 1990. Ĝi montras la aŭkcion kiun gvidis Torsten Lund. Post la kafo kun kukoj aranĝita de Elsy Lindblom-Vel. Åke Palm prezentis sian albumon kun konataj klubaj esperantistoj. Tion sekvis diapozitivoj kun i a floroj iam faritaj de Allan Johansson kaj nun konatigitaj al ni de Per-Olov Johansson.
Agrabla vespero kun multaj memoroj.

Gertrud Lund

## Svenska Esperanto-Förbundet

SEF erbjuder sina medlemmar att prenumerera på esperantotidningar för 2003.
Du beställer tidningarna genom att sätta in pengar på postgiro 14 74 29-5, SEF specialkonto, samt att på talongen ange vilka tidningar, som avses.
Vill du fråga något ytterligare kan du göra det hos:

**Lisbet Andreasson**
**Södra Rörum, Husarlyckevägen 29, 242 94 Hörby**
**tel. 0415-50152**

| Tidning | Nr/år | Pris kr |
|---|---|---|
| Brazila Esperantisto | 4 | 160* |
| Esperanta Finnlando | 6 | 135* |
| Esperanto | 11 | 310 |
| Esperanto-Dokumentoj | 10 | 240 |
| Esperanto en Danio | 5-6 | 125 |
| Retventoj (nästan dagligen) | | 180 |
| Fonto | 12 | 285 |
| Heroldo | 17 | 280 |
| ICEM | 4 | 175 |
| Informoj de EAE | 4 | 80* |
| Juna Amiko | 4 | 115 |
| Komencanto (större nr) | 6 | 140 |
| Kontakto | 6 | 185 |
| La Hirundo | 8 | 100 |
| La Jaro (kalender) | 1 | 49 |
| La Kancerkliniko | 5 | 190 |
| La Ondo | 12 | 235 |
| Literatura Foiro | 6 | 260 |
| Litova Stelo | 6 | 135 |
| Monato | 12 | 410 |
| Monato, retversio | | 246 |
| Norvega Esperantisto | 6 | 100* |
| Oomoto | 2 | 100* |
| Rok´ Gazet (pris för 3 nr) | 1 | 155 |
| Scienca Revuo | 4 | 190 |
| TEJO tutmonde | 4 | 95 |

Tidningar markerade med * har inte lämnat prisuppgift för 2003

Abonu Esperanto-gazetojn, por ke vi sciu kio okazas en la Esperanto-mondo. Legu Esperanto-librojn - aŭ iru al bibliotekoj, vi samtempe montras ke troviĝas homoj, kiuj legas Esperanto-literaturon.

# Kontaktilo

Membrogazeto de K.E.K
Konversacia Esperantista Klubo Kopenhago



**LA ESTRARO**
Prezidanto kaj redaktoro
Jytte Sunekær

Kasisto
Ib Sunekær
Højlundshusene 16
3500 Værløse
Tlf: 44 48 47 26
jytte.sunekaer@mail.tele.dk
Ĝirkonto de K.E.K.
202 55 58

Sekretario kaj vicprezidanto
Bent Wiinberg
Nældebjerg Allé 30
2670 Greve
Tlf: 43 90 42 01
E-poŝto: teo@post11.tele.dk

Membroj
Helen Claesson
Sven Friis Jørgensen
Bellahøjvej 130, 2. tv.
2720 Vanløse
Tel: 38 28 25 66
svenfriis@hotmail.com

**Libroservo de DEA**
Ib Sunekær
La stoko: Vester Voldgade 94
libroservo@esperanto.dk

## Libroservo de DEA ofertas:

Klasikaj libroj:

**”La mastro de la ringoj”,** kiu konsistas el 3 libroj, nome:

1. **Kunularo de l'Ringo.** La unua parto de ”La mastro de l'ringoj”. J.R.R.Tolkien. Tradukis W.Auld. Sezonoj 1997 (2-a eld.). Epopeeca rakontego pri la imagita mondo; la heroo devas detrui magian ringon, kies ekzisto minacas la tutan mondon. Prezo: 219,25 DKK.
2. **La du turegoj**, la dua parto de ”La mastro de l'ringoj”. J.R.R.Tolkien. Tradukis W.Auld. Sezonoj 1996. Prezo: 219,25 DKK.
3. **La reveno de la reĝo.** La tria parto de ”La mastro de l'ringoj. J.R.R.Tolkien. Tradukis W.Auld. Sezonoj 1997. Prezo: 219,25 DKK.

Alia verko ”La Hobito aŭ tien kaj reen. Sezonoj 2000. Tradukis Chris Gledhill kaj W.Auld (kantoj) Mirfabelo de la aŭtoro de ”La mastro de l'ringoj”. Prezo 168,50 DKK.

## Impresoj de Klint

Pere de Helen kaj Sven Friis Jørgensen la redakcio de Ponto ricevis artikolon de Mihai Trifoi, Rumanio, kiu vizitis Klint la10-an ĝis la 20-a de aŭgusto. Li skribis inter alie:

”Unu el miaj pli lastaj revoj estis viziti la Martinus Centron en Klint kaj partopreni la kursojn pri kosmologio. Finfine ĉi jare mi pasigis nekredeble belajn tagojn en Klint. Tie mi estis gasto en loĝejo kun bonegaj kondiĉoj, partoprenis la ege interesajn prelegojn kaj debatojn, studis la ĉefajn simbolojn de ”La Eterna Mondbildo”, aŭskultis spertajn oratorojn, kaj eĉ sukcesis esti dum dek tagoj vera vegetarano.

La etoso de la partoprenintoj estis admirinda, la atmosfero de la laboro tre serioza, kaj la proksima maro kaj la dolĉa suno oferis al ĉiuj partoprenintoj ĝojon, trankvilon kaj esperon.

Kun la espero ke iam mi revenos al Klint, mi estas rekonema ne nur al Ejnar kaj Else, al Ole, al Sven kaj Helen, al Ib kaj Bent, sed al ĉiuj aliaj kune kun kiuj mi provis sperti la vivon en la spirito de Martinus. Sinceran saluton al ĉiuj”.

#### Esperantokursejo Lesjöfors

Interesa seminario de la Sveda-Esperanto Instituto okazis en la konata E-Kursejo, dum la lasta septembro. Prelegis Atilio Orellana Rojas kaj Ralf Frohlich. Atilio parolis pri la agado Indiĝenaj Dialogoj kaj pri kulturo de la Inkaa Imperio. Ralf pri Informado pri Esperanto analizita laŭ profesiaj varbmetodoj kaj pri aktualaj projektoj de la E-movadoj en interreto. Partoprenis 46 samideanoj, inter ili 8 kursanoj de la lasta kurso de Karlskoga

#### Prelego de Ileana Schrøder:

## ”Kiamaniere solvi konfliktojn adekvate?”

Jaŭdon, la 7-an de novembro, 2002.

Per tiu ĉi prelego la Kopenhaga Esperanto-Kulturgrupo daŭrigis sian trian sezonon de siaj kulturaj aranĝoj per la supre citita prelego. Ankaŭ - kaj precipe - en nia tempo la temo estas aktuala. Konfliktoj ekestas ĉie en la mondo kaj en ĉiuj medioj. S-ino Schrøder montris kiel preskaŭ ĉiuj konfliktoj, ĉu interlandaj, ĉu personaj, evoluas kaj plifortiĝas laŭ sama modelo, se neniu klopodas bremsi ilin. Per amuzaj desegnaĵoj kaj simplaj grafikaĵoj ŝi montris la kutiman evoluproceson kaj priskribis la elirvojon. Jam en la komenco s-ino Schrøder invitis al dialoga prelego, kies rezulto estis tre vigla diskuto pri la temo. Oni povas konstati, ke ambaŭ celoj de Esperanto-kunveno estis plenumigitaj. La partoprenintoj estis enkondukitaj en interesan temon kaj en viglan diskutadon, eble tiom vigla, ke mi ne estas tutcerta, ke s-ino Schrøder trovis eblecon prezenti sian tutan materialon. Nu, grave estas ke la vespero firmigis la sukceson de la du pasintaj sezonoj.

Gratulon al la aranĝantoj de la kulturaj vesperoj kaj al ni partoprenantoj pro la iniciato, kiu nun por la tria sezono riĉigas nian Esperanto-vivon.

L. Thune

## Trofeo Fyne al SEJU

En la universala kongreso en Zagreb en 2001 Sveda Esperanto-Federacio ricevis la trofeon Fyne, kiun UEA donas al la landa asocio, kiu estis aparte aktiva. Laŭ la reguloj la landa asocio devas pludoni la trofeon al loka organizaĵo. La estraro de SEF decidis doni la trofeon al Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo, pro ilia bona kunlaboro kun TEJO pri diversaj seminarioj, precipe seminario pri Esperanto en interreto. SEJU aktive laboris por ricevi financajn subtenojn kaj vere sukcesis en tio.

## Klubo Esperantista de Helsingborgo

Karaj!

Jam estas meze de decembro, monato plenŝtopita de tradicioj kaj ”devoj”. Ĉu vi purigis la domon kaj metis elektrajn kandelabrojn aŭ stelojn en la fenestrojn?

La aŭtuna studsezono de la 2002a jaro finiĝis. La ”kerno” de nia klubo diligente prilaboris la Auld'an ”Paŝoj al plena posedo”, malgraŭ ke la taskoj kelkfoje estas tro malfacilaj por ni. Ni decidis daŭrigi dum la printempa semestro de 2003, (Ĉu pro la bongustegaj sandviĉoj de Barbro? Koregan dankon!) sed eble nur ĉiun duan semajnon.

Ni havos renkontiĝojn en Faktorsgatan 5 kiel kutime la trian dimanĉon en la monato, tio estas: 19/1, 16/2, 16/3, 18/5 kaj 15/6. Ni ”saltas” aprilon pro mia foresto. Krome ni parolis pri rostofesto kaj ekskurso, sed ankoraŭ ne decidis kiam kaj kie.

La komencantoj progresas. Ili havas ampleksan hejmtaskon dum la feriada periodo kaj rekomencas la kurson la 16an de januaro. Kelkaj jam decidis partopreni en la UK.

LKK en Gotenburgo en novembro sendis la unuan parton de ”Kurso por funkciuloj kaj helpantoj de UK 2003”. La dua venos en januaro. La kursletero instigas nin lerni pri i.a. kongresoj, estraranoj, stabanoj de CO, komitatanoj de UEA kaj Akademioj de Esperanto.
Se vi ankoraŭ ne aliĝis al la helpantaro de UK, anoncu vin ĉe Andreas Nordström, Esperanto-Societo de Gotenburgo, Masthuggsliden 1, 413 18 Göteborg, aŭ rete al andreas.n@bredband.net.

BONAN KRISTNASKON kaj FELIĈAN NOVAN JARON !

## Miskompreno

Kiu neniam vojaĝis eksterlanden povas malfacile imagi la problemojn, kiuj povas stariĝi, se la koncerna persono ne scias la lingvon de la lando vizitata. Jen ĉi-sube trafa ekzemplo.

S-ro ALBERTI, profesoro en Universitato, estas defendanto de Esperanto. Tio tedas lian edzinon. Ŝi, de slava deveno, parolas la rusan, la germanan, la italan, la anglan kaj kompreneble la francan. ”Via Esperanto? Stultaĵo!”
Foje gesinjoroj Alberti haltas en Irun, ĉe la franca-hispana limo. Ili eniras en kafejon, prenas kafon kun kremo. Sed ŝi deziras ankaŭ buteron por ŝmiri pecon da pano. Kiel vi konstatas, la hispana estas fremda al ŝi. Sed ŝi opinias, ke paŭsante la hispanan vorton sur la franca ”beurre”, ŝi sukcesos komprenigi sin. Do ŝi alvokas: Kelnero! BOURRO!”
Imagu la mienon de la kelnero, kiu sin demandas, kial ŝi insultas lin.
Sciu, - sed ŝi mem ne sciis – ke en la hispana: BOURRO = AZENO!
la rakonto estas de S-ro Alberti.
El la ”unua legolibro, ”40 paŝetoj

## La Esperanto klubo de Lund

Karaj LEK-anoj!

Alproksimiĝas nia antaŭkristnaska festo en la Zamenhofa Tago,
laŭ plifrua anonco. Kiel promesite vi ricevos apartan invitilon.
Laŭtradicie kelkaj klubanoj reprezentis LEK dum la vespera aranĝo de la UN-tago kun kelkaj ofertitaj libroj.
Ĉiu-jare ĉeestanta korusestro ricevis nian kantaron kaj, sendepende de tio, korusano aĉetis tiun kajeron. Ĉu venontjare la 24an de oktobro ni aŭskultos kantojn en nia lingvo?
Eble.

Ni ĝoje povas rakonti, ke plej verŝajne komence de 2003 okazos lingvokursoj por kaj komencantoj kaj progresantoj.

Al ĉiuj legantoj de PONTO bondezirojn okaze de kristnasko kaj novjaro!

Anna-Maria Lange

La 7an de novembro hejme ĉe Ulla Saether renkontiĝis 13 personoj - tri el ili trovis sin en esperantista rondo la unuan fojon. Post tre bongusta supo kaj varmaj bulkoj hortikulturisto Staffan Andersson, kunstudento de mi helpe de lumbildoj rakontis pri liaj aventuroj en Afriko. Staffan kaj alia sveda hortikulturisto realigis projekton (subtenita de SIDA) por Relma en Kenjo kaj Tanzanio. La du hortikulturistoj esploris la perspektivojn por kultivi pom- kaj pirarbojn en tiaj lokoj, kie la klimato plejparte estas tropika. Laŭnorme pom- kaj pirarboj bezonas la sezonojn de la malvarmaj zonoj por bone ekflori kaj ekfrukti. Staffan montris multajn lumbildojn, kaj interese rakontis pri la projekto, kaj ankaŭ pri la mirindaj lokoj kaj homoj, kiujn li renkontis dum lia restado en Afriko. Post la bildmontrado ni havis longedaŭran diskutadon.

| | | |
|---|---|---|
| Sabate 14.12 | KEKG, Kopenhago | L.L. Zamenhof—festvespero. Detaloj pri la programo vidu Ponto 6, paĝo 3 |
| Dimanĉe 15.12 | LEK, Lund | Zamenhofa Tago kaj Tago de Esperantoliteraturo. IM-kafe Spolegatan 10 C, Lund |
| Lunde 16.12 | DEFA, Kopenhago | JULMIKO, aliĝo necesa plej malfrue la 10-an de decembro ĉe Karen, tel. 55 72 73 77. Abunda manĝado kaj ĝiskora ujutnado por 60 DKK. Trinkaĵoj je moderaj prezoj |
| Lunde 06.01 | DEFA, Kopenhago | Je 18.30 komuna manĝado. Kunportu buterpanojn aŭ mendu ĉe Ruth (tel. 36 46 62 79); 18.45-20.30 porkomencanta kaj pordaŭriganta kursoj; 20.00-21.45 studgrupoj |
| Lunde 13.01 | DEFA/KEK Kopenhago | 18.45-20.30 porkomencanta kaj pordaŭriganta kursoj. 20.00-21.45 KEK programo: Kunportu objekton kaj rakontu pri ĝi, aŭ prezentu historion |
| Merkrede 15.01 | KEKG, Kopenhago | ”Korpo kaj Animo” Pensoj de skulptisto pri la psikologio de la gravito. Prelego de Jesper Neergaard |
| Dimanĉe 19.01 | KEH, Helsingborg | La studgrupoj kunvenas |
| Lunde 20.01 | DEFA, Kopenhago | 18.45-20.30 Porkomencanta kaj pordaŭriganta kursoj. 20.00—21.45 studgrupoj |
| Merkrede 22.01 | KEM, Malmö | Floroj kaj beroj. Karin kaj Bernt Lindquist montros bildojn kaj rakontos pri ili |
| Lunde 27.01 | DEFA, Kopenhago | 18.45-20.30 porkomencanta kaj pordaŭriganta kursoj. 20.00 DEFA-menbrokunveno |
| Lunde 03.02 | DEFA, Kopenhago | Je 18.30 komuna manĝado. Kunportu buterpanojn aŭ mendu ĉe Ruth (tel. 36 46 62 79). 18.45-20.30 porkomencanta kaj pordaŭriganta kursoj. 20.00-21.45 studgrupoj |
| Merkrede 05.02 | KEM, Malmö | Viva gazeto. Ĉiuj povos kontribui |
| Lunde 10.02 | KEK, Kopenhago | **Ĝeneralkunveno. Tagordo laŭ la leĝoj.** Proponoj estu ĉe la prezidanto 10 tagojn antaŭe |
| Lunde 10.02 | DEFA, Kopenhago | 18.45-20.30 porkomencanta kaj pordaŭriganta kursoj. |
| Dimanĉe 16.02 | KEH, Helsingborg | La studgrupo kunvenas |
| Marde 18.02 | KEKG, Kopenhago | J. S. Bach. Birthe Traerup prelegos pri la komponisto. |
| Merkrede 19.02 | KEM, Malmö | Jarkunsido de KEM, tagordo sur paĝo 3 |

Informoj pri horoj kaj adresoj ktp. sur paĝo 8!

# Informoj pri esperantokluboj kaj grupoj de SEA

**Klubo Esperantista de Malmö, K.E.M.**
La kunvenoj komenciĝas je la 18.30 h
en Kronetorpsgatan 94, 212 27 Malmö
Kontaktpersonoj: sten@agado.net
aŭ karin@agado.net
Karin Lindquist,
Sergels väg 14 A, 217 57 Malmö,
tel. 040-98 01 20

**La Esperanto Klubo de Lund, L.E.K.**
La klubejo Erik Dahlbergsgatan 3 B, Lund
La kunvenoj okazas neregule. Vidu la kalendaron.
Kontaktpersonoj: Anna-Maria Lange,
Bredgatan 27, 222 21 Lund, tel. 046-147309
aŭ rete: Allan Ljungstedt,
allan.ljungstedt@telia.com

**Klubo Esperantista de Helsingborg, K.E.H.**
La kunvenoj okazos je la 14-a horo en Faktorsgatan 5.
Bonvolu informiĝi ĉe Ann-Louise Åkerlund
tel. 042-291262 aŭ 042-186639 (oficejo) aŭ ĉe
Barbro Haraldsson tel. 042-121471

Hejmpaĝo de SEA: www.agado.net

**Konversacia Esperantista Klubo Kopenhago, K.E.K.**
kunvenas en la ejo de DEFA, Vasbygade 10, Kopenhago — elektitajn lundojn inter 19.30—22.00. Por eniro: uzu la sonorilon ĉe la pordo.
Prezidanto: Jytte Sunekær, tel. 0045-44 48 47 26
e-poŝto: jytte.sunekaer@mail.tele.dk
Hejmpaĝo de KEK www.esperanto.dk/kek

**Kopenhaga Esperanto-Kulturgrupo, KEKG**
Aranĝoj en Medborgerhuset, Danasvej 30 B, atingebla per buslinio 29 el stacio Vesterport, salono n-ro 1, dua etaĝo.
Pordoj malfermitaj 19.00-23.00. Ĉiu prelego okazos ĉ. 19.30 – 20.30.
Se vi deziras detalojn pri la prelegoj aŭ havas demandojn pri la aranĝoj bonvolu turni vin al Torben Svendsen, Vanløse Alle 57,
DK-2720 Vanløse. Tel. 0045-38 74 97 64
rete: tsv@vip.cybercity.dk

**Fervojista klubo en Kopenhago, DEFA**
Kunvenejo Vasbygade 10. Kontaktulo: Astrid Birkbak, tel. 44 97 43 29
Ĉiun lundon retbabilejo inter la horoj 19a kaj 22a je adreso: www.karelia.komputilo.org

---

**Esperanto ĉe vojkruciĝo**
Eltiraĵo el la artikolo de Humphrey Tonkin

La Esperanto-movado, komence de nova jarcento, venas al vojkruciĝo. Ĝi frontas Herkulesan elekton: ĉu sekvi la vojon de plezuro, ĝuante la lingvon ĉar ĝi ekzistas, kaj funkcias, kaj povas bele amuzi; ĉu sekvi la vojon de agado, en kiu ĝi plene engaĝiĝas kun la mondo kaj provas plenumi aŭtentike utilan funkcion.

...Kaj jen ni venas al la esenca demando: Pro kio nia Esperanto? Ĉe tiu vojkruciĝo ni ne neglektu la internan vivon de la esperantistoj, sed ni ankaŭ memoru, ke nia unua devo estas plivastigi kaj pliefikigi tiun komunumon tiel ke ĝi etendiĝu al multe pli da homoj. UEA kaj la diversaj landaj kaj fakaj asocioj havas respondecon plifortigi la socion, kiu ligiĝas pere de Esperanto (tute sendepende, cetere, de tio, ĉu ĝi membras en tiuj organizaĵoj), sed tiu respondeco estas nur fundamenta elemento en multe pli larĝa agadkampo, en kiu Esperanto aperu kiel alternativo al la nuna monda lingva reĝimo.

La agadkampo de UEA bone difinas la *Strategia Laborplano de UEA*, kiu estas organizita ĉirkaŭ tri bazaj aktivecoj: *Informado, Instruado, Utiligado.* Tiuj tri kolonoj formu bazon de nia komuna agado.
...Eble la vojmontrilo ĉe la vojkruciĝo kie ni nun staras indikas al iu tia "Esperanto Internacia" unudirekte kaj al iu konata ŝablono alidirekte. La konata ŝablono plezurigas kaj amuzas, sed por engaĝi la pli vastan mondon la *Vojo de Plezuro* ne sufiĉas: necesas la *Vojo de Agado*. Ek al dinamika kaj aganta, tutmonda Esperanto Internacia!